

Kulturdomo de Esperanto

Kastelo Greziljono, Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé en Anjou
telefonnumero : +33 (0)2 41 89 10 34
retadreso : kastelo@gresillon.org
www.gresillon.org
RCS Angers n° 522 621 556

Kunvokilo al Eksterordinara Membrokunsido vendredon 25 aprilo 2014 je la 14a en Kastelo Greziljono

Tiu ĉi membrokunsido temas pri kreado de « societaj B-partoj » [partoj de la societa kapitalo], kun la celo altigi la kapitalon kaj tiel ebligi financadon de konstrulaboroj por konservado kaj renovigo de la kastelo. La modifo de la statuto ebligas ankaŭ korekti vortarojn (« akcio » anstataŭ « societa parto » en kelkaj artikoloj). La asembleo decidis do pri la kvar jenaj rezolucioj :

UNUA REZOLUCIO

La membrokunsido decidis, laŭ la artikolo 11 de la franca leĝo de 1947-09-10, kreadon de societaj partoj nomataj « B-partoj », la nunaj partoj je 16 € iĝantaj A-partoj. Tiam societan B-parton rajtos akiri nur membro posedanta minimume unu A-parton. Akirado estos libervola, ĝi partoprenos en variebleco de la societa kapitalo kaj rajtigos statutan jaran interezon egalan je interezo de francaj ŝparkontoj « livret A » plus 0,5%, sed nur se la jara profito estos sufiĉa por pagi la tuton de tiu ĉi interezo post la leĝe devigaj provizadoj. Se la neta profito ne sufiĉos por pagi tiun ĉi interezon, oni ne rajtos apliki la artikolon 17 de la franca leĝo 47-1775 de 1947-09-10. La interezo ne estos prokrastita al la posta jaro nek prenita el la rezervoj antaŭe arigitaj.

La B-partoj valoras po 200 €; la maksimuma nombro da B-partoj posedataj de unu sola societano estas 50 partoj. La kreadon de tiuj ĉi partoj ne sekvas iu ajn pliigo de la devoj de la societanoj, kiuj estas liberaj akiri aŭ ne tiujn ĉi societajn partojn.

DUA REZOLUCIO

La Membrokunsido, sekve de la unua rezolucio, decidis modifi jene la artikolon 3 de la statuto :

Artikolo tri

Artikolo tri (malnova versio)

Konforme al la artikolo 7 de la franca leĝo de 1947, ne ekzistas statute fiksita kapitalo. La minimuma societa kapitalo estas $\frac{1}{4}$ de la plej alta kapitalo deposedata de la kooperativo. Ĝi rajtos senfine kreski pro akceto de novaj akcioj fare ĉu de malnovaj ĉu de novaj societanoj. La parto, kiu ebligas fariĝi membro de la societo valoras 16 €. Ĝi ne gajnigas interezon.



Vendredon 25 aprilo 2014,

Okazos ankaŭ la tago kun **malfermitaj pordoj** en kastelo Greziljono, same kiel la **spektaklo** prezentota de la infanoj de la renkontiĝo FRINGOJ.

Se vi deziras manĝi aŭ eĉ dormi en la kastelo, kondiĉe, ke estos disponeblaj lokoj, bonvolu kontakti nin: kastelo@gresillon.org; telefono: 02 41 89 10 34

Se vi ne povos partopreni tiun ĉi Eksterordinaran Membrokunsidon, bonvolu sendi la jenan rajtigilon al: **Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Greziljono, Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé en Anjou**

Artikolo 3 (nova versio)

La kapitalo estas variebla. Konforme al artikolo 7 de la franca leĝo 47-1775 de 1947-09-10, ne ekzistas maksimuma statute fiksita kapitalo.

La minimuma societa kapitalo de la Societo, kaze de repago pro ekŝigo, ekŝigo, perdo de societanece laŭ la tria paragrafo de la artikolo 6, estas $\frac{1}{4}$ de la plej alta kapitalo depost la ekesto de la kooperativo.

La minimuman societan kapitalon, $\frac{1}{4}$ de la plej alta kapitalo depost la ekesto de la kooperativo, oni kalkulas konsiderante ĉiujn kategoriojn de societaj partoj.

Tiu ĉi kapitalo rajtos kreski senfine pro aĉeto de novaj partoj fare ĉu de malnovaj ĉu de novaj societanoj.

La societa kapitalo estas dividita en societaj partoj de kategorio A kaj de kategorio B.

3.1 Societaj partoj: komunaj reguloj

La societaj partoj estas nomaj kaj nedivideblaj. La Societo agnoskas nur unu posedanton por ĉiu el ili.

Ĉiu aĉeto de societaj partoj okazigas subskribadon de aĉet-bulteno fare de la societano.

La statutaj reguloj aplikiĝas al ĉiuj kategorioj de societaj partoj, krom specifaj reguloj antaŭviditaj en artikoloj 3.2 kaj 3.3 ĉi-poste.

La societanoj rajtas decidi aĉeti libervole societajn partojn, kondiĉe, ke tion akceptos la administra komitato, kiu prijuĝos laŭ objektivaj kriterioj enkalkulante interalie la utilecon por la kooperativo de tiuj aĉetoj kaj la proporcion de la kapitalo, kiun povas posedi la aĉetanto, por garantii ekvilibron inter societanoj, sendepende de la fakto, ke aĉeto de pliaj partoj ne rajtigas plian voĉdonrajton.

3.2 Societaj partoj A-kategoriaj

Ĉe aniĝo, la societano estas devigata aĉeti kaj plene pagi almenaŭ unu societan parton A-kategorian valorantan 16 €, per kiu li aŭ ŝi akiras societanecon.

A-partoj estu komplete pagitaj ĉe aĉeto; ili ne provizas interezon.

3.3 Societaj partoj B-kategoriaj

La B-kategoriaj societaj partoj estas kreitaj laŭ la artikolo 11 de la franca leĝo de 1947-09-10, kiu ebligas krei partojn kun specifaj avantaĝoj.

Neniu rajtas posedi B-kategoriajn partojn se li aŭ ŝi ne aĉetis almenaŭ UNU A-kategorian parton. Tiuj B-kategoriaj partoj estu komplete pagitaj ĉe aĉeto.

B-partoj valoras po 200 €. Maksimuma nombro da B-partoj, kiujn unu sama societano rajtas aĉeti, estas 50 partoj.



RAJTIGILO

por sendi se vi ne povos partopreni la Eksterordinaran Membrokunsidon. Memorigo :

« ĉiu societano rajtos ricevi nur 5 rajtigilojn. Pliaj rajtigiloj estos konsiderataj nevalidaj ». Aliflanke, rajtigiloj senditaj sen nomo de rajtigito, nomataj « blankaj rajtigiloj », estos konsiderataj favoraj al la projekto de rezolucioj proponita aŭ modifita de la Administra Komitato, kaj malfavora al ĉiu alia projekto. La rajtigiloj sendataj por la nuna Membrokunsido kunsidanta post unua kunvokado restos validaj por la Membrokunsido, kiu kunsidos post dua kunvokado se ne estos kvorumo ĉe la unua Membrokunsido.

Mi subskribinto:

rajtigas

reprezenti min dum la Eksterordinara Membrokunsido de la Kulturdomo de Esperanto, vendredon 25 aprilo 2014.

dato kaj subskribo

B-partojn kompensas jara statuta interezo egala je procento de la francaj A-ŝparkontoj plus 0,5%, sed nur okaze de sufiĉa profito por pagi la tuton de tiu ĉi interezo post la diversaj leĝe devigaj provizadoj. Okaze de nesufiĉa profito, la interezo ne estos pagita.

La societano ne rajtas postuli repagon de siaj B-partoj malpli ol TRI jarojn post la aĉeto de la partoj, kies repagon li aŭ ŝi petas, escepte okaze de ekŝigo aŭ ekŝigo.

La posedo de B-partoj donas neniun specifan aŭ plian voĉdonrajton.

TRIA REZOLUCIO

La Membrokunsido decidas modifi la artikolon 14 de la statuto konforme al tiu ĉi nova artikolo 3, kaj korekti en artikoloj 8 kaj 14 la vortaron konsistantan el uzado de la vorto « akcio » anstataŭ « societa parto », ĉar la societo estas kooperativa kaj civila societo, ene de kiu la partoj neniam estas revendeblaj.

Artikolo dekkvar (malnova versio)

La kontoj de la societo estas finkalkulitaj ĉiujare je la 31a de decembro. La financa situacio estas raportita por transdono al la Jarkunsido kaj disponigo al ĉiu societano, kiu volus sciiĝi pri ĝi, dekkvin tagojn antaŭ la Jarkunsido en la sidejo de la Societo.

En la kazo, ke la librotenado montrus jaran profiton, tiu ĉi estos uzata por disvolviga fonduso cele al pligrandigo de la Societo, post:

- *depreno de 15%, kiu aldoniĝu al la deviga rezerva fonduso,*
- *eventuala pago de ristorno al la societanoj, kiu partoprenis la agadon, laŭ la kondiĉoj difinitaj en la interna regularo. .*

La jarkunsido rajtas decidi enigi en la kapitalon sumojn prenitajn el rezervoj cele al altigo de la valoro de la societaj partoj aŭ disdono de senpagaj societaj partoj, konforme al la artikolo 16 de la franca leĝo de 1947-09-10.

Artikolo dekkvar (nova versio)

La kontoj de la societo estas finkalkulitaj ĉiujare je la 31a de decembro. La financa situacio estas raportita por transdono al la Jarkunsido kaj disponigo al ĉiu societano, kiu volus sciiĝi pri ĝi, dekkvin tagojn antaŭ la Jarkunsido en la sidejo de la Societo.

En la kazo, ke la librotenado montrus jaran profiton, tiu ĉi estos uzata por disvolviga fonduso cele al pligrandigo de la Societo, post:

- depreno de 15%, kiu aldoniĝu al la deviga rezerva fonduso.
- pago de interezo al la posedantoj de B-partoj, laŭ la kondiĉoj antaŭviditaj en artikolo 3.3,
- se tion proponis la Administra komitato kaj tion aprobis la Jarkunsido, pago de ristorno al la societanoj, kiu partoprenis la agadon, laŭ la kondiĉoj difinitaj en la interna regularo.
- La jarkunsido rajtas decidi enigi en la kapitalon sumojn prenitajn el rezervoj cele al altigo de la valoro de la societaj partoj aŭ disdono de senpagaj societaj partoj, konforme al artikolo 16 de la franca leĝo de 1947-09-10.

KVARA REZOLUCIO

La Membrokunsido komisiis la Administran komitaton tiel korekti la statuton. Ĝi donas al la Prezidanto de la Administra komitato same kiel al ĉiu persono, kiun li mem komisiis, ĉiun rajton aranĝi la deponajn kaj publikigajn devigajn formalizaĵojn.

La Administra Komitato

La Jarkunsido de Kulturdomo de Esperanto

okazos **dimanĉon, 18 majo 2014, je la 10a**
en kastelo Greziljono, Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé en Anjou.

Dum tiu ĉi jarkunsido, krom la agadraporton kaj la finanĉan raporton, oni traktos interalie:

Renovigo de la Administra Komitato

La nuna Administra Komitato konsistas el 9 membroj:

Elektitaj ĝis 2016:

François LO JACOMO
Armelle PIOLAT
Bert SCHUMANN
Pierre (Ŝtonĉjo) SOUBOUROU

Elektitaj ĝis 2014:

Elisabeth BARBAY
Espéranto-France
Xavier GODIVIER
Jannick HUET - SCHUMANN
SAT-Amikaro

La deka membro elektita en 2012, Grégory DENIS, demisiis en oktobro 2012 pro personaj kialoj (manko de disponebleco).

Ni do **elektos ses administrantojn.**

ALVOKO AL KANDIDATIĜO

La kandidatoj al la Administra Komitato
bonvolu sin anonci antaŭ la **10a de aprilo 2014**
al : baloto@gresillon.org
aŭ per poŝta letero al **Kulturdomo de Esperanto**,
kastelo Greziljono, Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé en Anjou

Cerbumado pri estonta transformiĝo de la Kulturdomo de Esperanto

Por rajti malfermiĝi, proponante servojn al ne-societanoj, la Kulturdomo de Esperanto devas laŭjure transiri de la statuso « civila societo » al la statuso « komerca societo », aŭ krei duan strukturon sub formo de societo aŭ asocio, kiu plenumu tiujn ĉi agadojn profite al ne membroj de la Kulturdomo. Tia transformiĝo ne eblas ĉi-jare, sed la diskuton pri tio oni komencu dum tiu ĉi jarkunsido. La Kulturdomo de Esperanto restos tamen kooperativa societo funkcia kvazaŭ same kiel nuntempe. Ĝi ne rajtas fariĝi franca SARL (Societo kun Limigita Respondeco), ĉar ĝi enhavas pli ol 100 societanojn. Por fariĝi franca SAS (Societo per Akcioj Simpligita), necesus la unuaniman konsenton de ĉiuj nunaj societanoj, kaj ne nur de la voĉdonantoj, kio aspektas nerealigebla. Restas la statuso franca SA (Anonima Societo), kiu interalie devigos nin havi konto-revizoron. La diversajn eblecojn oni prezentos dum la jarkunsido, la finanĉan decidon faros Eksterordinara Membrokunsido, kiun oni kunvoku principe venontjare.

La kunvokilon al tiu ĉi Jarkunsido ni sendos al vi baldaŭ, tamen ŝajnis al ni dezirinde averti vin jam nun.

La Administra Komitato